# Instruistoj !

# Pedagogoj kaj edukistoj !

# Gepatroj de lernejanoj !

***Jen finfine la Internacia Pedagogio Revuo***

## LA REVUO KIUN VI ATTENDIS...

Lu dua mondmilito malaperigis « *Internacian Pedagogian Revuon* », eldonitan de *T.A.G.E.*, forumon kaj interligilon de la esperantistaj edukistoj ĉiulandaj dum pli ol deksep jaroj.

La nova « *Internacia Pedagogia Revuo* » celas rekrei tian forumon kaj interligilon, sen kiu asocio eĉ multmembra fakte ne ekzistas, ne vivas.

La esperoj estas grandaj, la komenco modesta. Ĝin ebligas la fakto ke la franca asocio de esperantistaj edukistoj (G.E.E.) — jam potenca asocio — evoluigis dulingvan revuon : ties esperanta parto, kiun daŭre ricevos la G.E.E.'anoj, konsistigas la kernon de la nova revuo. Same, ĉirkaŭ la kerno de la ĝisnunaj verkantoj, ni intencas arigi kunlaborantojn el ĉiuj landoj. La nova revuo estos internacia ne nur per lingvo kaj enhavo sed ankaŭ per siaj legantoj kaj kunlaborantoj.

Ni elektis modestan rimedon, sed ĝi estas saĝa : rilate al sia antaŭa revuo G.E.E. sin devontigas liveri nur kelkajn paĝojn pli ĉiumonate. La financaj riskoj do ne estas konsiderinde tro grandaj kaj la G.E.E.'anoj estas certaj nenion perdi. Dependas nur de la alilandanoj kaj pli ĝenerale de la abonantoj al *Interncia Pedagogia Revuo*, ke tiu ĉi unue vivu, kaj poste disfloru. G.E.E. tra la jaroj sukcesis krei al si revuon grade pli interesan, pli riĉan. Nun, Kolegoj el la tuta mondo, ni apelas al via solidaro por krei ankoraŭ pli belan revuon, indan de nia movado.

*La antaŭmilita I.P.R.* aperis meznombre per 6 kajeroj kaj 100-180 paĝoj jare. Nia revuo aperos, ĉiumonate (krom aŭguste kaj septembre), per dek kajeroj 12-paĝaj, t.e. 120 paĝoj jare. Afluo de novaj legantoj, tre rapide ebligos liveri pli da paĝoj en la jaro. Ni ne promesas montojn, sed ni estas certaj teni kion ni promesas.

Pedagogio estas scienco kaj arto instrui kaj eduki ; nia revuo estas internacia kaj esperantlingva. Ni do turnas nin ĉefe al ĉiuj pedagogoj kaj instruistoj sed ankaŭ al ĉiuj gepatroj kiuj interesiĝas pri la eduko de siaj infanoj ; ankaŭ al ĉiuj esperantistoj kiuj volas partopreni en la instruado de la internacia lingvo aŭ eduki siajn proprajn infanojn per esperanto.

Plie ni ne forgesas ke bedaŭrinde ĝis nun oni ne lernas esperanton kiel infano aŭ eĉ kiel lernejano sed plej ofte kiel plenkreskulo : nia intenco estas do liveri al la instruistoj, kiuj ĵus « finlernis » esperanton, taŭgan materialon por perfektiĝi ; taŭgan materialon — lingvan kaj kulturan — kiu samtempe donos al ili, se necese, kompetentajn indikojn kiel siavice instrui.

UNUVORTE nia revuo havos jenajn karakterizojn : Ĝi ne estos seke scienca por izolaj fakuloj sed alloge praktika por ĉiuj. Okaze, ĝi allasos ĝeneralinteresan sciencan traktadon. Ĝi ebligos diskonigi la novajn kaj diversajn teknikojn de moderna eduko kaj instruo. Ĝi kreos kontaktojn sur internacia tereno inter la edukistoj kaj la gepatroj de lernejanoj kaj aliparte inter la profesiaj edukistoj kaj la bonvolemaj — kelkfoje tre spertaj — esperanto-instruantoj.

La Redakcio.

**« Servo al pedagogio,**

**Amo al Paco,**

**Fido al progreso. »**

(J. K Haubold,
IPR 1932/2, p. 41).